



GERALD TUCKER

SUPERRIGARDO PRI

LA EKZAMENOJ DE GERMANA ESPERANTO-INSTITUTO

Germana Esperanto-Instituto (GEI) ofertas kvar ekzamenajn nivelojn, nomitaj:

- A. **KURSFINA EKZAMENO**
- B. **EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO**
- C. **SUPERA EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO**
- D. **KURSESTRA EKZAMENO**

Instruista ekzameno tial ne ofertiĝas, ĉar Germanujo estas *federacia respubliko* kaj la jura ekzamenrajto por instruistoj estas afero de la unuopaj federaciaj landoj kun ties edukministerioj. Ĉar neniu federacilanda edukministerio trejnas instruistojn, neniu en Germanujo, eĉ neniu universitato, posedas kompetentecon pri trejnado de Esperanto-instruistoj.

Kiel ero de la privata institucio *Germana Esperanto-Asocio* (GEA), GEI atingas maksimume la kompetentecon de la plikleriga ŝtupo (por plenkreskuloj) de la germana edusistemo. Tiu ŝtupo estas submetita al la Federacia Edukministerio, kiu kontentiĝas per observado de la evoluo.

Tial GEA (t. e. ICH) povas kaj rajtas trejni *instruant/ontojn* de la Internacia Lingvo kaj profesiaj *instruistoj* povas partopreni tiucelajn kursojn kaj ricevi atestilon de *Kursestra Ekzameno*.

Pli altrangan pruvilon de lingva kaj didaktika kompetentecoj eĉ instruisto ne povas atingi, ĉar neniu federacigermana edukministerio disponas pri oficisto kun atestilo pri iu ajn Esperanto-ekzameno.

PRI LA NOTSISTEMO

Kiam GEI estis regata de la Bavara Edukministerio, ĉi tiu postulis la uzadon de la tiama 5-ŝtupa sistemo (noto 1 = tre bone ... noto 5 = nesufiĉe).

Je la transiro el la jurisdikcio de la ministerio al sendependa formo, la notoj en la lernejoj havis 6-ŝtupan distribuon, kiun la novorganizita Instituto transprenis:

1 =	tre bone	4 =	sufiĉe
2 =	bone	5 =	manke
3 =	kontentige	6 =	nesufiĉe

Ĉiu ekzamenero ricevas po apartan noton. El la skribaj kaj parolaj notoj kalkuliĝu po meznoto (averaĝo) je centonoj. La finnoto estas la entjero de la averaĝo de la skriba kaj parola averaĝoj (ekz.: averaĝo 1,49 = finnoto 1, averaĝo 1,50 = finnoto 2). La ekzamena rezulto estas "nesufiĉe" se la fina averaĝo estas malpli bona ol 4,49, se en du ekzameneroj estas aljuĝita la noto 5, aŭ se en unu ekzamenero estas aljuĝita la noto 6.

Atestilon ricevas nur, kiu kun sukceso trapasis la ekzamenon. Sur la atestilo aperas nur la entjera finnoto. Kaze de la Kursfina Ekzameno la atestilo portas nur la indikon "sukcese" sed ne noton, eĉ se la konstato de sukceso baziĝas sur notoj.

APARTE PRI LA KURSFINA EKZAMENO

Ĝis nun la Kursfina Ekzameno kaj la Ekzameno pri Lingva Kapableco estas trapaseblaj en dulingva (Germana – Esperanta) kaj unulingva (nur Esperanta) formoj. Tio momente ankoraŭ estas la oficiala stato, sed por la Kursfina Ekzameno ekzistas malneto de formo, en kiu la lingvodistribuo dependas de la instrumaniero. Se la kurso estos unulingva, kun nur esperantlingvaj ekzercoj, la ekzameno mem estu unulingva. Se la kursestro instruis helpe de la landa lingvo, li/ŝi ellaboru sian ekzamenon konforme al la ekzerca materialo.

La kaŭzo por la nova formo estas:

1. En Germanujo multaj kursestroj estas el generacio, kiu mem ne havis ŝancon lerni lingvojn laŭ pli moderna instrumaniero.
2. La nova formo donu al la kursestro pli da libereco en la elekto kaj ellaborado de la ekzameneroj.

Kvankam la ĝisnuna Kursfina Ekzameno estas ankoraŭ oficiala kaj la decidprocedo pri la nova ankoraŭ ne finita, la Fakestro por Ekzamenoj de GEI aprobis la eksperimentan uzadon de la nova formo.

Sube ambaŭ versioj estas prezentitaj.

A. KURSFINA EKZAMENO

NIVelo: SIMPLA

Celo: Konfirmo ke la kandidato regas la lernendaĵon de la kurso kaj kapablas ĝin uzi parole kaj skribe

Ellaboranto: Kursestro

Komisiono = Kursestro + 1 ekzamena komisaro

Sinanonco: senforma (ĉe la kursestro)

Kotizo: € 2,50 (pagenda antaŭ la komenco de la ekzameno)

Atesto: Enhavas nur konfirmon de sukcesa trapaso ricevota nur okaze de sukceso dulingva (E – G) subskribota de la kursestro kaj la ekzamena komisaro

Dulingva Kursfina Ekzameno	Unulingva Kursfina Ekzameno
<p>I. Skriba</p> <ol style="list-style-type: none">1. traduko Esperanto – Germanen simpla, mallonga; 15-minuta2. traduko Germana – Esperanten simpla, mallonga; 15-minuta3. Diktaĵo simpla, mallonga; 10-minuta	<p>I. Skriba</p> <ol style="list-style-type: none">1. Diktaĵo simpla, mallonga; 10-minuta2. Lega Kompreno demandaro pri antaŭmetita teksto skribe respondenda; 10-minuta
<p>II. Parola</p> <p>Demandoresponda dialogo laŭ la temoj de la kurso 5 – 10-minuta</p>	<p>II. Parola</p> <ol style="list-style-type: none">1. Aŭda Kompreno Demandoj pri simpla Esperantlingva teksto laŭtlecita de la kursestro; ĉ. 5-minuta2. Laŭtlega tasko Simpla E-lingva teksto kiel prononcekzerco - 5-minuta3. Rerakonto de supra teksto – 10-minuta

B. EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO

NIVelo: MEZA

Celo: Konfirmo ke la kandidato kapablas sufiĉagrade parole kaj skribe interkompreniĝi en Esperanto

Ellaboranto: Ideale la komisiono, se necese la Instituto

Komisiono = 2 ekzamenaj komisaroj de la Instituto

Sinanonco: skriba (ĉe la komisiona prezidanto)

Kotizo: baza: € 30,00 (pagenda antaŭ la komenco de la ekzameno);
pri rabatoj vidu sube

Atesto: Enhavas nur la entjerigitan meznoton de ĉiuj ekzameneroj ricevota nur okaze de sukceso dulingva (E – G)
subskribota de ambaŭ ekzamenaj komisaroj kaj de la fakestro

<p style="text-align: center;">Dulingva Ekzameno pri Lingva Kapableco</p> <p style="text-align: center;">I. Skriba</p> <ol style="list-style-type: none">1. traduko Esperanto – Germanen simpla; 30-minuta2. traduko Germana – Esperanten simpla; 30-minuta3. eseeto pri unu el tri elekteblaj temoj; 45-minuta	<p style="text-align: center;">Unulingva Ekzameno pri Lingva Kapableco</p> <p style="text-align: center;">I. Skriba</p> <ol style="list-style-type: none">1. sencoplana kompletigo de teksto, en kiu vortoj mankas2. simpla; 15-minuta kritika komento pri difinitaj punktoj de antaŭmetita teksto; 45-minuta3. eseeto pri unu el tri elekteblaj temoj; 45-minuta
<p style="text-align: center;">II. Parola (kune 20 minutoj)</p> <ol style="list-style-type: none">1. konversacio pri temo de la ĉiutaga vivo2. Interpretado de simpla konversacio en Esperanto inter la ekzamenantoj en la germanan3. respondado en Esperanto al kelkaj simplaj demandoj pri Esperanto kaj la hodiaŭa movado.	<p style="text-align: center;">II. Parola</p> <ol style="list-style-type: none">1. konversacio pri temo de la ĉiutaga vivo (5 minutoj)2. Difinado de kelke da ĉiutagaj vortoj (5 minutoj)3. respondado en Esperanto al kelkaj simplaj demandoj pri Esperanto kaj la hodiaŭa movado. (10 minutoj)

C. SUPERA EKZAMENO PRI LINGVA KAPABLECO

NIVelo: ALTA

Celo: Konfirmo ke la kandidato kapablas flue paroli kaj senerare kaj lerte skribi en Esperanto

Ellaboranto: Ideale la komisiono, se necese la Instituto

Komisiono = 2 ekzamenaj komisaroj de la Instituto komisiitaj por la supera ekzameno

Sinanonco: skriba (ĉe la komisiona prezidanto)

Kotizo: baza: € 30,00 (pagenda antaŭ la komenco de la ekzameno);
pri rabatoj vidu sube

Atesto: Enhavas nur la entjerigitan meznoton de ĉiuj ekzameneroj ricevota nur okaze de sukceso dulingva (E – G) subskribota de ambaŭ ekzamenaj komisaroj kaj de la fakestro

Supera Ekzameno pri Lingva Kapableco	II. Parola (kune po 30 minutoj por ĉiu kandidato)
<p>I. Skriba</p> <ol style="list-style-type: none">1. traduko Esperanto – Germanen altnivela; 30-minuta2. traduko Germana – Esperanten altnivela; 30-minuta3. eseo pri unu el tri elekteblaj temoj; 60-minuta <p>La traduktesktoj ebligu prijuĝon pri la kapablo de la kandidato percepti kaj traduki krom ĉiutagajn tekstojn ankaŭ tiajn de literatura, scienca, ekonomia aŭ alia simpla faka naturo.</p>	<ol style="list-style-type: none">1. konversacio en Esperanto2. interpretado el la germana en Esperanton kaj inverse3. ekzameno el la Esperanto-gramatiko4. ekzameno el la Esperanto-literaturo5. ekzameno pri la lingva problemo kaj la historio de la Esperanto-movado.

D. KURSESTRA EKZAMENO

NIVelo: ALTA

Celo: Konfirmo ke la kandidato kapablas instrui Esperanton en kurso.

Ellaboranto: Ideale la komisiono, se necese la Instituto

Komisiono = 2 ekzamenaj komisaroj de la Instituto
komisiitaj por la kursestra ekzameno

Sinanonco: skriba (ĉe la komisiona prezidanto)

Kotizo: ankoraŭ ne fiksita

Atesto: Enhavas nur la entjerigitan meznoton de la partoj de la kursestra ekzameno kunkalkulitaj kun la supera ekzameno ricevota nur okaze de sukceso dulingva (E – G)
subskribota de ambaŭ ekzamenaj komisaroj kaj de la fakestro

Kursestra Ekzameno

Konsistas el:

1. Supera Ekzameno pri Lingva Kapableco
2. instruprovo

La atesto pri la supera ekzameno ne nepre devas esti novdata se la kandidato estas aktuale tiunivele aktiva.

Instruprovo

Konsistas el:

1. memstare en germana lingvo ellaborita leciono kun
 - a. didaktaj antaŭpripensoj
 - b. metodikaj antaŭpripensoj
 - c. skriba leciona malneto
2. instruprovo antaŭ grupo de (ge)lernantoj pri temo nomita de la ekzamena komisiono almenaŭ 14 tagojn antaŭ la ekzameno